Universala Esperanto-Asocio

**KONFERENCO de ILEI**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

*Estrara Komuniko: EKO 2015-27 sendita al Oostendo, la 22an de julio.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo.

Karaj,

La ĉefa celo de ĉi tiu komuniko estas prezenti al vi kelkajn fotojn el la nune disvolviĝanta Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en Ostendo. Pli plenaj detaloj pri la konferenco venas kaj venos de ILEI mem; ni komprenas, ke ili ne havas manieron aldoni aŭ vidigi bildojn – ja en *Facebook* sendube svarmas konferencaj bildoj.



La plimulto de la publiko por la Internacia Vespero; okazis ankaŭ memorinda Eŭropa vespero.

## Salutoj de UEA al la Konferenco de ILEI


La prezidanto de UEA, Mark Fettes, sendis saluton, kiu aperis en la Konferenca Libro. Malferme, li skribis: "Kunvenante sur belga tero, vi ne devos longe serĉi por trovi spurojn de la 'grandaj militoj', al kiuj aludas via konferenca temo. Tiuj militoj lasis cikatrojn ne nur sur la pejzaĝo de Belgio sed ankaŭ en la koroj kaj memoroj de ĉiuj popoloj, kiuj trovis sin envolvitaj en tiuj malhelaj eventoj. Por eviti ripeti ilin, ni devas unuavice ne forgesi ilin, kaj klopodi ĉerpi instruojn el ili."


La vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill, salutis persone. Jen resumo de liaj vortoj: "Granda paco. Tion oni devas pene konstrui kaj poste flegadi, de generacio al generacio". Reprenante vortojn de Mark Fettes, li diris plie: "Tiu devo emfazas la gravegan rolon de edukado en la defendado kaj fortigo de la paco. Esperantistaj instruistoj estas aparte konvenaj por plenumi tiun edukan rolon – unue, ili estas vaste dissemitaj tra la mondo, due, ili tendencas havi internaciecan kaj interkulturan sintenojn."

Poste li memorigis pri la konferenca historio; okazis ĝis nun nur tri konferencoj kun pli ol 150 partoprenantoj: en Locarno 1979 (CH), Gödöllo 1981 (HU) kaj Łodż 1987 (PL). Pri UEA li raportis, ke laborplanoj por 2015-16 kaj propono por 2017-2020 estas en aktiva preparo. Fine li menciis bonvenige la jubilean Universalan Kongreson, kiu sekvos tuj post la nuna kunveno.

Vortoj: 290







En la internacia vespero: Cornelio dos Santos Verdial el Orienta Timoro, Eruda Li el Honkongo, Ĉinio, kiu koncertos ankaŭ en UK, kaj Jasuo Hori el Japanio, demonstrante malkutimajn muzikilojn.



Trio el Armenio dum la internacia vespero.



Prezento kultura en publika placo kun urbanoj kaj esp-istoj

Fotoj: Monika Molnar

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Se vi volas vidi pli malnovajn komunikojn iru al:

http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

PDF kreita de Nuance Power PDF